# HEJS

BULTENO DE

HISPANA ESPERANTO JUNULARA SEKCIO

Nro. 38
Septembro - Oktobro 1964

REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY
POŜTKESTO 26
Arce, 8, 2.º, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo



## 20.ª INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

## DE T. E. J. O. EN AMSTERDAM

## 20-a I.J.K. de T.E.J.O.

Fakte la 20-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. en Amsterdam estis sukcesa.

Kiel kutime la L.K.K. aranĝis la loĝadojn, ekskursojn, amuzaĵojn; kaj ĝenerale ĉiuj servoj funkciis orde kaj bone.

La interamikiĝo certe estis granda, mi kunvivis kun pli ol 225 gejunuloj el 23 landoj, tio kio signifas ke mi povis interparoli kun samideanoj de malproksimaj landoj kiel Kanado, Mali, Togo, ktp.

Malgraŭ la pluvema vetero (mi malmulte vidis la sunon), mi havas tre bonegajn memorigaĵojn pri Amsterdam, kiu estas belega urbo kun mulnombraj kanaloj, pontoj, turoj kaj mirindaj domfasadoj konstruitaj dum la mezepoko. Nia restadejo Brosk in Waterland estis plenplena de kanaloj. Anserojn kaj bovinojn trapasis la ĉirkaŭaĵoj de nia kampara urbeto.

Inter la diversaj aktoj, estas rimarkindaj: la prezentado de "La morto de lia Ekcelenco" de Mátković, "La Homo kun la ploro enbuŝe" de Pirandello kaj la Edziĝpropono" de Ĉeĥov, interpretitaj de la Internacia Arta Teatro; la kabareda programo de studenta Esperanto klubo de Zagreb; la vizito al la Ana Frank-Domo; la akceptado fare de la Urbestraro de Amsterdam kaj la visito de la ŝtata Muzeo.

Mi multe amuziĝis en la rondveturo tra la kanaloj de Amsterdam, eĉ mi povis naĝi en studenta naĝejo kaj multe manĝis dum la lunĉo de bierfarejo "Amstel".

Ankaŭ mi ekskursis tra Nederlando en kiu ni vizitis la urbon Hilversum, la ĝardenurbo, kie la urbestro akceptis nin kaj alparolis al ni esperantlingve. Poste ni vizitis la studsalonon de Radio -Asocio AVRO.

Mi vivis ok esperantaj tagoj plenaj de ĝoĵo kaj amikeco, kaj certe estis tre bona sperto partopreni Junularan Kongreson. Pro tio mi konsilas al ĉiuj nepre partoprenu Internaciajn Junularajn Kongresojn.

La tempo forflugis kaj denove hejmen, mi ankoraŭ sopiras pro la belegaj kongrestagoj pasintaj en Nederlando.

Maria Teresa Magriá

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La Redakcio petas al vi geleganto j de HEJS bonvolu verki pliajn prelegetojn pri KION HODIAŬ SIGNIFAS EŬROPO? ni akceptos tre volonte publikigi viajn ideojn

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (T.E.J.O.)

Parto de la estrara raporto pri la agado dum la jaro 1963-a --- 1964-a

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

### RILATOJ KUN LA LANDAJ SEKCIOJ

Ili estas nun 19: Aŭstralia Esperantista Junulara Asocio, Aŭstria Esperanto-Junulara, Belga Esperantista Junulara Asocio, Junulara Esperantista Brita, Bulgara Esperanto-Junularo, Junulara Esperantista Franca Organizo, Germana Esperanto Junularo, Hispana Esperanto-Junulara Sekcio, Hungara Esperanto-Junularo, Itala Esperantista Junularo, Japana Esperantista Junulara Organizo, Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio, Korea Esperanto Junularo, Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro, T.E.J.O.-Nederlando, Junularo Esperantista de Nordameriko, Pola Esperanto-Junularo, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo kaj Esperanto- Junulara de Svislando.

Dum la pasinta jaro fondiĝis la aŭstralia, la aŭstra, la hungara, la korea; ilia peto pri aliĝo al TEJO estis provizore akceptita de la ĝenerala sekretario, kaj ĝi estos submetita al la komitato de TEJO por definitiva akcepto.

Kontaktoj kun lokaj movadoj, kie estas eblecoj pri baldaŭa starigo de TEJO-sekcio, estis establitaj kun Brazilo kaj Danlando; male, ĝis nun ne sukcesis klopodoj kun Novzelando, ĉar NZEA montris mankon de intereso pri fondo de junulara sekcio.

### KORESPONDA SERVO

Nuntempe ekzistas rilatoj nur kun tri landaj KS-oj: germana, hispana kaj itala sekcioj de TEJO.

K.S. de TEJO havas nun fortan korespondkontakton kun pluraj neesperantistaj K.S-oj, nome "The Pen Pal Directory of All Nations" en (Danlando), "World Hobbies" en (Usono) kaj aliaj, Ankaŭ multaj neesperantistaj gazetoj publikigis adresojn senditajn de K.S. de TEJO kiel "Radar"

### TRADUKA SERVO

Ĝi ekzistas ĝis nun por la lingvoj: angla, dana, germana, itala. Ĝi ankoraŭ neniam estis utiligita.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La kampanjo komencita jam pasintjare donis bonajn fruktojn. Dum la pasinta kongreso en Vraca venis kiel gasto reprezentanto de MFDJ. Por la kongreso en Amsterdam promesis intervenon reprexentantoj de WAY, ISMUN, FIDCES,

Interŝanĝe tri delegitoj de TEJO (dunçan Charters, Pere Julia (1) kaj Bernard Stollan) partoprenis en konferenco de WAY.

## INFORMADO

Sur la informa kampo menciindaj estas: modela agado ĉe la jugoslava televido; bone organizita Informa Fako de G.E.J.; aperigo de la Junulara Informa Servo en Pollando; speciala informnumero de "Kvinpinto". Provo krei ligojn per "Bulteno de la Estrarano" pri informado restis pli malpli sen reeĥo.

## KULTURAJ AFEROJ

Estis organizitaj oratoraj konkursoj en Sofio, Hago kaj Amsterdam, Krome ili okazis ankaŭ en pluraj landoj sur nacia nivelo.

## EKSTEREŬROPA AGADO

Ĝiaj ĉefaj resultoj estas la fondiĝo de la sekcioj en Aŭstralio kaj Koreo, kaj la rilatoj kun la brazila junularo. Bonegaj rilatoj estis kun la japana kaj madagaskara sekcioj; fiaskis klopodoj en Novzelando, kaj estis neglektita plano pri agado en Meksikio.

## AFRIKA KAMPANJO

Dum sia vintra kunsido, la estraro de TEJO komisiis al la Centro de Esploroj pri Afriko de P.E.J. ellabori planon pri agado en Afriko. Tiu plano estis efektive antaŭnelonge ellaborita, kaj ĝi estis sendita al la L.S. Ankaŭ JEOM sendis planon pri agado en Afriko, kaj la komitato devos decidi pri la realigo de definitiva plano.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

(1) S-ro Pere Julia estrarano de HEJS dum la jaroj 1959-a kaj 1960-a kaj TEJO-Delegito en Hispanujo

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LA PLEJ GRAVAJ REZULTOJ DE LA ESTRARAJ KAJ KOMITATAJ DISKUTOJ DE 20-a I.J.K. DE T.E.J.O. ESTIS:

1.Elekto de nova estraro de T.E.J.O. La prezidanton G. Becker (Germanujo-Saarlando),kiu gvidis la organizon dum 8 jaroj, sekvis Ivo Osibov (Jugoslavio), ĝis nun redaktoro de "La Juna vivo". Dum tiuj 8 jaroj la membro-nombro de T.E.J.O. kreskis de proks. 1000 ĝis preskaŭ 10.000; la landaj sekcioj pliiĝis 18 en ĉiuj kvin kontinentoj. Ankaŭ la revuo "Kontakto" ekestis en tiu periodo.S-ro Becker, kiun la komitato de U.E.A. elektis ĝenerala sekretario de U.E.A., ekestis la unua honora prezidanto de T.E.J.O. Aliaj membroj de la estraro nun estas: S. Simeonov (Bulgario) kaj H. Tonkin (Usono), vicprezidantoj, C. Minnaja (Italujo) ĝenerala sekretario; U. Lins (Germanujo) kasisto; S. Zlatnar (Jugoeslavio). Y. Umeda (Japanujo) kaj M. Pietrzak (Polujo) membroj.

2. Decido pri kunlaboro en la "Jaro pri internacia kunlaboro".kiun proklamis la U.N. Koncerna komisiono indikos pli precizan paŝojn farendajn. Tamen oni jam decidis helpi la kampanjon komencitan de U.E.A. pri varbado de subskriboj por "Propono", prezentota al la U.N. ĈIU T.E.J.O.- MEMBRO ESTAS PETITA HELPI? MENDANTE KELKAJN LISTOJN ( a ) KAJ PLENIGANTE TIUJN PER SUBSKRIBOJ DE SIAJ GEAMIKOJ KAJ GEKONATOJ.

3.- Oni instalis komisionojn por daŭrigo kaj plivastigo de :

- Kontaktoj kun ne-esperantistaj junularaj organizoj (NEO)
- esploro de la lingva problemo en Afriko (surbaze de la raporto de CEA)
- evoluigo de la internaciaj komtaktoj inter lernejoj, sin bazante sur la rekomendoj de la Internacia Konferenco de lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

( a ) H.E.J.S.- MEMBROJ KUNLABORU EN LA "JARO PRI INTERNACIA KUNLABORADO" PETANTE AL LA REDAKCIO DEKOJN DE FOLIOJN. str. Arce 8-2-4 Cornella

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## ĈU VI VOLAS PARTOPRENI LA PROSPERON DE ESPERANTO INTER LA JUNULARO ?

La estrato de T.E.J.O. laboris dum la pasinta jaro sub la plej malfacilaj deĵoraj cirkonstancoj. La rapida evoluo de TEJO, rezulta kresko de organiza laboro, kaj la ĉiam pli mulnombraj okazoj progresigi Esperanton en internacia kampo, jam preterpasis la gvidajn kapablojn de sepmembra estraro.

Se dum la pasintaj du jaroj TEJO gvidis kaj prizorgis la sukcesa realigon de la vasta kampanjo "Jaro de la Junularo"; ĝi starigis la propran gazeton "KONTAKTO"; ĝi eliris sian eŭropan kadron per akiro de sekcioj en Nordameriko, Azio, Afriko kaj Aŭstralazio-fakte duobligante la nombron de aliĝintaj sekcioj, ĝi intense kunlaboris pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, intensa rilatado kun neesperantistaj organizoj ktp.........

Kaj ĉiam la laboro - kaj eblecoj- kreskas !

La estraro antaŭvidas ke dum la venonta jaro la kresko de TEJO daŭros. Se jes tre baldaŭ la organiza aparato fariĝos tiel neadekvata ke TEJO simple ĉesos bone plenumi sian rolon en la ĝenerala movado!

La estraro de TEJO do apelacias al vi persone, se vi volas vidi kaj partopreni la prosperon de Esperanto inter la junularo, se vi pretas ankaŭ fidele helpi en nia laboro, turnu vin al iu ajn estrarano aŭ rekte al Komitatano de TEJO en Hispanujo S-ro S. Aragay str. Aroe nº 8-2-4- Cornella

Ĉi tiu estas serioza proponu kaj ni petas ke vi ne ignoru ĝin.

De ĝia bona solvo, pere de VIA HELPO dependas la estonteco de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

La estraro

JARABONO AL LA REVUO "KONTAKTO" NUR KOSTAS 128 PESETOJ
Sendu vian abonon al S-ro R. Molera, Joaquina 13 Moyá.

Gejunuloj ankoraŭ ne 22-jaraj povas ricevi la revuojn kontakto, Esperanto K. la du jarlibrojn se ili aliĝas al U.E.A. kaj abonas NUR 240 ptoj.

Gejunuloj de 22 ĝis 25-jaraj ricevos same se abonas 320 ptoj. Abonu nepre.

-o-o-o-o-o-o-o-

## KION HODIAŬ SIGNIFAS EŬROPO ?

Estas evidente ke ni ne intencas diskuti larĝe la geografian amplekson de Eŭropo, kvankam eĉ tio prezentus al ni gravajn problemojn, ekz. la teorion ke Eŭropo estas konsiderenda nura apendico de la grandega kontinento Azio, kion kelkaj sciencistoj emas esprimi per la vorto "Eŭrazio". Do, ni tamen volas enketi niajn mensojn pri la - ni diru- interna signifo de Eŭropo", t.e. pri la spiritaj aspektoj de Eŭropo.

Delonge jam abundas en niaj gazetoj kaj en radio traktaĵoj pri tiu Eŭropo, sed apenaŭ iam temas pri la sama imago. Ĉu temas nur pri la Eŭropa Ekonomia Komunumo, ĉu pri la Komekono (la orienta sistemo por reciproka ekonomia subtenado), ĉu pri la Okcidenteŭropa Unio (kiu ampleksas krom las ses statojn ankaŭ Grandbrition) aŭ ĉu temas pri la Eŭropa Konsilantaro? Eble eĉ pri NATO? Anticipe mi respondas: nek pri unu nek pri alia ekskluzive! Ĉiuj supraj sistemoj kovras, certe, po iun parton el Eŭropo, sed neniam tiun tuton, kiun ni kutime imagas uzante la esprimon "Eŭropo"; kelkaj el tiuj sistemoj eĉ inkluzivas vastajn teritoriojn ekster la Kutime agnoskataj geografiaj limoj de Eŭropo !

Ĉu eble ni devas pli profunde puŝi nian serĉilon? Ĉu la vera Eŭropo estas trovebla en la antikva grek-romia filozofio? Eventuale kristanismo estas la esenco de Eŭropo, aŭ ĉu la plej novaj ideologioj: liberalismo, demokratio, konservativismo ktp, reprezentas la kernon de Eŭropo? Monotone ni devas refoje respondi: nek unu nek la alia eksklusive rajtas pretendi tion! -Se ni konsentas pri tio ke ĉiuj supre menciitaj (kaj cetere multaj aliaj) efective ekzistas en la geografia Eŭropo, se tamen neniu el ili vere estas Eŭropo, ĉi tiukaze Eŭropo kiel ĝenerala spirita fenomeno eble tute ne ekzistas? Provizore ni respondu per: jes kaj ne:

La eldiron de la unua prezidinto de la Federacia Respubliko Germanio, prof. Theodor Heus, ke Eŭropo baziĝas sur tri montoj: Getsemaneo ĉe Jeruzalemo, la Akropolo ĉe Ateno kaj la Kapitolo de Romo-tiun eldiron ni devas tamen kompletigi. La kvara faktoro de Eŭropo konkretiĝis post la disfalo de la romia imperio (476) en junaj ĝermanaj ŝtatoj. La plej frua kaj ŝajne plej grandioza kombino de tiuj kvar elementoj (kristanismo, greka filozofio, romia juro kaj ĝermana ŝtatismo) okazis dum la 8-a kaj 9-a jarcentoj en la frankona regno de Karlo la Granda (Karlomagno) Tiu regno evidente tute ne ampleksis la .......

-o-o-o-o-o-o-o-

kompletan geografian Eŭropon, sed ni povas ĝin konsideri la ĉefa aktivigo de la plej fortaj tendencoj de la tiu-tempa Eŭropo, ĉar ĉiuj iom altsignifaj eroj iuforme ĉeestis la vivon de tiu imperiestro. Ŝajnas al mi, ke tiuj supre menciitaj kvar ĉefelementoj restis dum pli-malpli unu jarmilo la akso de la eŭropa vivo, ĝis kiam, ĉefe dum la 18-a jarcento, la racionalisma klerigismo esence skuis tiun ordon, eĉ renversis ĝin: la francaj enciklopediistoj, la franca revolucio kaj la diversaj " ismoj" de la 19-a jarcento klare demontras la ĉeradikan lukton en kaj pri Eŭropo. Tute koncize ni diru ke la ĉefa karakterizaĵo de tiu jarcento estas la vasta forĵeto de mezepokaj ĉenoj kaj la detruo de arkaikaj privilegioj, el kio rezultis la imago pri demokratio kaj liberaj homoj.

Tiuj ideologioj koncernantaj nian kompletan estaton kaj inter si batalantaj plej sovaĝe, ili karakterizas nian hodiaŭan Eŭropon --- kaj per ĝi la mondon ! Jen ĝi antaŭ ni: disŝirita, vigla, sovaĝa, kreema, maljuna, kaj jusnaskita samtempe, volanta sed, almenaŭ ŝajne, nekapabla harmonie vivi.?

Mallarĝasence jen jam devus esti la fino de nia malgranda enketo, ĉar ni - almenaŭ laŭ nia imago - trovis la esencon de Eŭropo. Tamen, ni kredu ankoraŭ pri pozitiva perspektivo. Tiu nuna disŝiriteco de Eŭropo, spirita kaj politika, devas esti konsiderata jam en si mem pozitivaĵo, ĉar ĝi multe pli bone respegulas la veran mondon ol tion povas la mezepoka unublokeco, ĉar tutsimple ekzistas ne uniformecaj mensoj, sed plej diversaj, kiuj, do, trovu sian konkretiĝon kaj konkentigon en la ekstera mondo. Se ni homoj tion agnoskas, ni povas konklude starigi nur jenan postulon: Ni respektu la individuan ekzistorajton de nia najbaro en la domo, la urbo, la ŝtato kaj nia tuta kontinento; ni venku nian egoismon kaj sincere akceptu tiujn homojn, kiuj volas vivi laŭ alia koncepto ol ni mem. Se nia malgrandega Eŭropo post jarmiloj da korpa kaj spirita interbuĉado sukcesos prezenti al la mondo tiun grandiozan ekzemplon de kompromisemo kaj aktiva toleremo, tiukaze Eŭropo ankaŭ post la disfalo de la antikvaj pensoj kaj ŝtatsistemoj konservos respektive reakiros sian fekundigan (tio tute ne signifas mond-regan) rolon sur nia terglobo!

Uwe Joachim Moritz

(Reverkita kaj koncizigita fare de la aŭtoro surbaze de referaĵo prezentita dum la kunveno de Hispana Esperanto-Junulara Sekcio en Valencia, la 23-an de julio 1964)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

NOTAS DE SECRETARIA

Socios que han efectuado el pago de la cotización anual

Srta. Magdalena Falcó y Sres. Edwin Hedges, J . Climent, Eduardo Pons, Albert, Mimó, Roger Mimó y R. Alberich.

Nuevo Socio Sr. Edwin Hedges.

-o-o-o-o-o-o-

Actualmente disponemos en la redacción y en la HEJS-Delegación en Barcelona los siguientes objetos:

| | |
|---|---|
| Insignia del 25 Congreso Juvilar ....... | 25 ptas. |
| Insignia esperantista caballero o.señora | 12 " |
| Banderines y banderas de Esperanto...... | 10 " |
| Ceniceros con dibujo .................. | 25 " |
| Platitos de Porcelana .................. | 45 " |
| Libro del Congreso .................... | 25 " |
| Cartel del Congreso .................... | 5 " |

-o-o-o-o-o-o-o-o-

El tema tratado de nuestro amigo y colaborador Uwe Josachim es verdaderamente fascinante e interesante por la diversidad de ideas que nos descubre y nos hace reflexionar. Por ello la redacción, desearía publicar otros trabajos del mismo tema, favorables o desfavorables al ahora publicado. Así pues todos cuantos se hallan interesados sírvanse enviar sus trabajos en Esperanto naturalmente, a la redacción.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

S-ro R. Jovani nuestro cajero nos informa que lamentablemente todavía muchos de nuestros abonados todavia no han efectuado el pago de la cotización anual.

Rogamos que lo más pronto posible se sirvan abonar la cotización directamente al Sr. R. Jovani Pasaje Pujós 16-19 Hospitalet (Barcelona)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

A igual de los años anteriores el último boletín Noviembre-Diciembre se enviará a contrareembolso a los socios que todavía no hubiesen efectuado el pago de la cotización y también a simpatizantes y antiguos HEJS- socios. Esperamos la máximo colaboración y ayuda de parte de todos los jóvenes. Gracias anticipadas.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

C

MA… …AS
CALLAU

Sa…, …02 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

…on
…n
juegos c…
b… etc.
inst…lación…
n…
el cliente

PJE. PUJÓ… 205 11 83
HOSP…

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans 292 bajos
41
B… …NA

ELDONEJO
KOKO

R… …ej 4
F

…ndita
7 …steloj